# Informilo

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER:
RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel

JARKOLEKTO
JAARGANG 6 N° 1 - JAN. 1986

## ATENTINDAĴOJ

08 02 1986 : Estrarkunsido de FEL

15 02 1986 : Malfermo de la SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO en Leuven :
- ekde 10.00 h. : debat-kunveno de FEL pri ĝiaj planoj rilate al estonta agado
- ekde 14.00 h. : akcepto
distra programo ĝis vespere ....

08 03 1986 : Festado de la 60-jara jubilieo de LA KONKORDO, Kortrijk.

15 03 1986 : Ĝenerala jarkunsido de FEL, al kiu ĉiu estas invitata.
Programo : kiel kutime : - ĝenerala raportado
- estrar-re-elekto
- propono kaj amendumado de laborplano por la venonta jaro.

PROTOKOLO

pri la kunsido de la komisiono de FEL pri informado, instruado kaj aliaj -adoj

sabaton 11.01.1986, Esperanto Centro Antverpeno.

UNUA PARTO : estraro FEL + komisiono

ĉeestas : Jan Bovendeerd (JB), Albert Claesen (AC), Petro De Smedt (PDS), Erik D'Hondt (ED), Ivo Durwael (ID, prezidanto), Hugo Fontyn (HF), Paul Peeraerts (PP), Edward Symoens (ES, ĝis 12a), Marc Vanden Bempt (MV, protokolo)

10h00 ĝis 12h30

1. Enkonduko

- la plej granda parto de la FEL-elspezoj estas uzata por interna agado, anstataŭ por informado eksteren kiu estu preskaŭ la sola celo por ĉiu Esperanto-asocio.
- tial ID kaj PP kontaktis "B-Promotion" (poste BPro), t.e. reklamo-informagentejo en Frankrijklei.

2. B-Promotion

- BPro (kompreneble) negative opiniis pri la ekzistanta informmaterialo. Ili proponis projekton por taŭge uzi la nun en FEL disponeblan buĝeton.
- Tiu projekto por unu jaro antaŭvidas :
  - reklamon en gazetoj kaj liberaj radioj : almenaŭ 2 en ĉiu monato
  - 'hejmstilon', t.e. emblemo ('logo'), afiŝo, kovertoj por Esperanto Programita kaj Monato, rondskribado, gazetaraj konferencoj
  - librofoiroj : ili disponigos breton en sia stando
- Posttagmeze ni detale priparolos la proponon
- La ideon, uzi profesian helpon por la FELinformado, ĉiuj aprobas. ID opinias ke la projekto pagos sin mem.

3. Ekspozicio

- Ni povis vidi la ekspozicion de FEL. Ĝi konsistas el deko da paneloj (± 100 x 70 cm), fikseblaj sur stangoj. La tuto estas sufiĉe malgranda por transporti en aŭtomobila kofro.
- La afiŝoj sur tiuj paneloj ne estas jam en ordo ...



DUA PARTO : komisiono

ĉeestas : Albert Claesen (AC), Petro De Smedt (PDS, prezidanto), Marc Vanden Bempt (MV, protokolo)
13h30 ĝis 17h30. Poste revenis ĝis 18h30 ankaŭ JB, ED, ID kaj PP.

Dum la posttagmezo ni detale priparolis la kvar punktojn de la tagordo, nome : informado (4a ero, unue priparolita) = BPro, manlibro FEL, instruistoj kaj ekspozicio.

1. Informado : BPro

1.1. BPro : gazetaro

- al la listo de gazetoj aldoniĝu Belang van Limburg, 'groep' Standaard, Laatste Nieuws ; ni forstreku 'la semaine d'Anvers' almenaŭ ĉi-jare
- revuoj : tro multekostaj
- ĉu estas anonco en la tutlanda aŭ nur regiona parto de la gazeto ? ĉu 10 x 7 cm ± ?
- Estas nur 12 anoncoj en grandaj gazetoj kaj 12 en Antwerpse Post.

1.2. BPro : hejmstilo

- emblemo : ili ne faru ĝin. Ni jam havas tiun de UEA ('E3') el kiu HF faru kelkajn proponojn por propra FEL-emblemo, ĝis la 1.3.86 (venonta kunveno)
- afiŝo : BPro faru proponojn por afiŝo uzebla por anonci aranĝojn de FEL kaj lokaj grupoj
- Esperanto Programita : BPro aranĝu bonan aspekton por la tuta kurso en unu libro. Ili enigu ĝin en normalaj butikoj kaj por tio ricevos grandan rabaton. Kiu ĝin aĉetas en butiko ne rajtas je korektado, krom se li/ŝi aldone pagas

sumon al FEL rekte. Por Test5000 FEL daŭre uzu la 4 broŝurojn. Se iu de Test5000 volas aĉeti la kurson, li/ŝi pagos rekte al FEL la normalan sumon por la nova libro kaj tiun ricevos.
La nova Programita kostu 980 fr.

- Ne BPro sed GCA (HF) renovigu la aspekton de Monato. Verŝajne estas teknike neebla ke ili faru tion, en 24 horoj.
- rondskribado al 3000 personoj : BPro prizorgu adresojn, FEL aldonu kelkajn. Ĉu ni vere profitos el ĉi tiu ero ?
- gazetara konferenco : BPro ĝin organizu. Sed FEL aldone prizorgu la manĝon (prezo ?) en la LVS-ejo. Kiom da gazetaraj konferencoj estas antaŭvidataj en la kontrakto ? Prepartempo ? Okazoj : apero de Programita, apero de Middelkoop, junulara kunveno novembro, S.I.A., U.K.

1.3. BPro : librofoiro

- BPro disponigos al FEL unu breton en sia stando en la novembra librofoiro. Kiom granda breto ? Ĉu BPro mem vendos ?
- kiom da aliaj librofoiroj ili antaŭvidas ?
- Por tio la nova Programita estu preta.

1.4. BPro : ĝenerale

- kvankam ni ĉi supre ĉiam parolis pri BPro, ID kaj PP petos saman oferton ankaŭ ĉe almenaŭ 2 aliaj agentejoj. Ni nur decidu poste.
- pago : ne ĉio ĉekomence
- kiu por FEL sekvos kaj kunordigos la tutan projekton ? Se neniu faros tion, BPro ankaŭ ne multe laboros.
- kiam komenci ? En gazetoj ekde 1.8.86, BPro do en majo.
- PDS faros kompletan demandoliston por ID, al BPro
- FEL ne uzu la tutan buĝeton, sed nur 4/7. Restu por pagi aldonajn kostojn (manĝoj, rondskribado-presaĵoj, ...) kaj rezervo por poste
- Necesas ŝanĝi la metodojn, ĉar nun la rezulto estas nenio : ni ne progresas. Se FEL devas dependi nur de la lokaj grupoj la afero daŭre ne progresos.



2. Manlibro FEL

- AC kaj MV opinias ke ĝi estos tre utila, se ĝi ne kostos tiom kaj estos pli kompleta.
  PDS estas kontraŭ ĝi se ĝi kostos monon al FEL, se ne li estas nek por nek kontraŭ.
- Kialoj de PDS : tro multekosta, ne utila (la informoj estas troveblaj aliloke), ĝisdatigo praktike ne eblos, oni trovu aliajn manierojn por interkomuniki spertojn (buŝe), pli bone unu centra persone sciu kie trovi informojn (GCA).
- Ni do faru ĝin pli malmultekosta : tajpi kaj kopii = 1 fr por A5 duflanka (maksimume) anstataŭ 7 fr por unuflanka A5.
- La enhavo estu ĉiam direktita al la praktiko : praktikaj informoj, konsiloj, listoj, ..., ne teoria babilado. Ĝi estu celata al grupestroj kaj organizantoj kiuj troviĝas meze en la praktiko.
- Aldone, laŭ propono de PDS, okazu buŝaj (kadro)kursoj : ili povas uzi la informojn en la manlibro aŭ inverse rezulti en pliajn informojn por ĝi.
  PDS jam proponas gvidi kadrokurson pri "organizado kaj gvidado de kurso". Konsentita.
  Mankas ĝis nun iu kiu povas (sperte) gvidi kurson pri "kiel kapti kursanojn en la grupkunvenojn".

3. Instruistoj

- Eĉ se nun enestas kelkaj, FEL volas malpermesi al novaj fuŝuloj eniri la liston de kursgvidantoj en Esperanto Panorama. Aŭ almenaŭ distingi inter bonaj kaj malbonaj.
- Propono nia : aldonu en Panorama indikon, ekz. 'PA' (provizora atesto) ĉe kursoj kies gvidanto sukcesis en FEL-ekzameno. Duagrada indiko estu 'DA' (definitiva atesto) ĉe kursoj kies gvidanto jam gvidis 3 kursojn sen perdi kursanojn (t.e. sama nombro en ekzameno kiel en 3a leciono).
- ekzameno : lingva kono, sed ankaŭ personeco gravas.
- la komisiono pli detale priparolis la proponitan regularon. PDS preparos novan regularon kaj sendos ĝin al AC kaj MV. Priparolota en venonta kunveno.

**4. Ekspozicio FEL**

- La paneloj jam estas FEL-propraĵo. Unu persono prizorgu la informmaterialon sur ili. Ni konsilas al tiu persono kunlaboron de HF.
- Ankaŭ la loka grupo mem se eble posedu propran ekspozici-materialon ...
- Krom paneloj :
  - tablo kun gazetartikoloj en Esperanto (gazetara dosiero) k.a.
  - oni klare vidu la vorton 'Esperanto'
  - skatolo kun kovertoj de leteroj
  - ĉiam ĉeestu iu en la ekspozicio kiu alparolu interes-atojn.
- La komisiono petas al (almenaŭ) ĉiu leganto de ĉi tiu raporto ke li/ŝi sendu proponojn por la paneloj k.s. al AC, PDS aŭ MV. Priparolotaj en venonta kunveno : ni elektu el ili por plua ellaborado en la Centro.

**5. Venonta kunveno**

sabaton 01.03.1986, je la 10h00 en Frankrijklei.

tagordo : - protokolo 11.01
- informado : kiun oferton elekti
  aldonaj rimarkoj ĉe protokolo 11.1
- manlibro : kiel en praktiko ?
- instruistoj : propono regularo PDS
- ekspozicio : envenintaj proponoj
- k.a.



# La interhomaj rilatoj en FEL - III

## ĜUI LA VIVON

Kiam mi vekiĝas en la mateno, kiam mi biciklas al la lernejo, kiam mi staras en vico en la poŝtoficejo, miaj pensoj forvagas de la nuntempa realo. Plej ofte mi forkuras en la estontecon : " Kion mi devos ankoraŭ fari hodiaŭ, kion mi skribas al Herman Deceuninck, ĉu eble Paulus ne forgesis, ke li promesis prelegi venontan vendredon, kiel mi povus atingi lin por memorigi tion ... " Tute klare mia Kritikema Gepatro superregas miajn pensojn. Mi estas pelita per tio, kion mi tiom ofte aŭdis en mia infanaĝo de miaj gepatroj : "Ivo, vi estas tiel malrapida, eku, pli vigle, eltenu, vi devas elteni, senkuraĝulo !!" Sed ankaŭ mia Infano povas ludi, prefere en fora estonteco : "Post 8 jaroj, mi pensiumiĝos kaj tiam mi vizitos Alberick en Barcelono kaj Ada en Madrid en feburaro aŭ marto, kiam la vetero estos milda kaj la prezoj malaltaj. Kaj ni ĝuos ..."
Sed plej ofte kaj ĝenerale pensoj reiras en la pasintecon. Tion mi ĉiu-foje rimarkas, kiam ni formas agrablan rondon. En la komenco oni parolas ankoraŭ iom serioze pri planoj, sed rapide, certe post kelkaj glasoj da biero aŭ brando, ni kune komencas elĉerpi nian tutan stokon da tra-vivaĵoj. La etoso pliviglíĝas, oni multe ridas kaj ĝuas la vesperon. La Infano - la parto de nia menso rilate al sentoj kaj spontaneco - superregas. Mi absolute ne volas malestimi aŭ kritiki tiajn agrablajn momentojn. Mi mem tro ĝuas ilin. Sed ni foje ekzamenu la ekstremojn de la du skizitaj situacioj.

S-ro Janssens ĉiam timeme kaj zorgoplene cerbumas pri la estonteco. Kiam familia rondo ridegas pro burleskaj memoraĵoj, li ne povas kunridi. Li opinias, ke oni perdas sian tempon. Li mallernis ĝui la vivon, far-iĝas acida, malagrabla, apenaŭ eltenebla por la ĉirkaŭaĵo, ĉar ĉiam "devoj" atendas.

S-ro Pieters estas 65-jara kaj konstante vivas en la pasinteco. Li povas aprezi neniun novaĵon. Ĉio estis pli bona en la pasinteco. Li daŭre komparas situaciojn kaj nur kritikas la nuntempon. En la flandra ni nomas lin "segulo". Per tia konduto li forpelas pli kaj pli da homoj el sia medio kaj eble finos sian vivon tute izolita, soleca kaj amara.

La vera ĝuanto de la vivo estas tiu kiu povas ĝui la nuntempon. Ŝajnas ke ne eblas daŭre vivi en la nuntempo. Homo ja ankaŭ ne povus vivi sen plani la estontecon kaj sen lerni el la estinteco. Sed provu foje de tempo al tempo esti tute konscia pri la momento en kiu vi vivas kaj kiel

vi sentas vin. "En la nuna momento, mi sentas ke mia stomako estas iom perturbita pro hieraŭ vespera diboĉo (kun esperantistoj !) (?), mia kapo iom peza.Mi nun ŝanĝas la pozicion de miaj piedoj, ĉar mi sidis en tordita pozicio. Mi sentas freŝan aeron. Mi ĝuas la momenton, ĉar mi povas skribi pri kio mi jam delonge pensis. Mi antaŭe tutsimple ne donis al mi la tempon por surpaperigi miajn ideojn.

La vivĝuanto estas tiu, kiu sidas en laborkunsido de la klubo, sed konsciiĝas ke meze de klarigo pri nova plano, iu oscedas pro tediĝo. Aŭ tiu, kiu malkovras ke ĉiuj kunlaborantoj kapjesas pri iu plano, sed tiom senentuziasme ke oni povus traduki " Faru ĝin, kiam vi volas, sed ne atendu helpon de mi." Aŭ tiu, kiu en agrabla rondo, ankoraŭ konsciiĝas kiom da glasoj li trinkas, ĝuas ankaŭ la lastan glason, konsciiĝas kiam la stomako komencas ribeli, ankoraŭ rimarkas la stelojn kaj la lunon en somernokto, ankoraŭ konsciiĝas kiam kaj kiel li vundis amikon per mokemaj rimarkoj.

Se vi povas esti pli konscia pri la nuntempo, vi konstatos ke via vivo subite fariĝas multe malpli prema kaj multe pli riĉa. Kaj tio ne-refuteble pliriĉigos ankaŭ la etoson en la grupo, la kurson, la rondon ... kiun vi gvidas.

ID.

------------------

K O M U N I K O J
-----------------

LIMBURGO : Albert Claesen transprenos la taskon de PROVINCA ADMINISTRANTO anstataŭ Guido Schroeyers.

----

Adres-ŝanĝo : Dro. Wim DE SMET transloĝiĝis al UNIV. NAT. RWANDA
BP 117
BUTARE, Rep. Rwanda.